


# FORSTISTA INFORMILO

de INTERNACIA FORSTISTA RONDO ESPERANTLINGVA  
kaj de PATRONA ASOCIO "LEXICON SILVESTRE" R.A.

Nr. 59 Eberswalde, 2010-10-15  
(Esperanta versio)

## D-ro rer. silv. Karl-Hermann Simon aĝas 80 jarojn

de Clivia kaj Stefan Panka



Je la 30a de septembro 2010 d-ro Karl-Hermann Simon aĝis 80 jarojn. Li estas la iniciatoro kaj kunfondinto de la grandlizometro en Britz proksime de Eberswalde kaj pioniro de "Lexicon silvestre". Certe la beleco de la Turingia Montaro, en ties softaj montetoj ja ne malproksime estas enkuŝigitaj lia naskiĝurbo Erfurt, ekvekis la amon al la naturo kaj precipe al arbaro. li ricevis unuajn karakterformantajn impulsojn en la gimnazio "Ernst von Harnack" en Merseburg, kie li pasigis la abituriantan ekzamenon en la jaro 1949. Ĉi tie por li naturo unuafoje fariĝis scienca studobjekto, kiu al li, ĝin pli detale esploranta, ĉiam progrese malkaŝis novajn mirindaĵojn. Pro tio estis memkompreneble, ke Karl-Hermann Simon post la abiturianta elzameni "ekmigris" Berlinon kaj studis forstajn sciencojn en la Forsta Fakultato Eberswalde de Humboldt-Universitato Berlino. Pasie li "ĵetis sin en la sciencojn" kaj finis la studadon 1953 kiel diplomita forstingenero. Li diplomiĝis ĉe prof. Göhre pri la temo

"Mikroklimataj reserĉoj pri la frostrisko de kultivaĵoj sur terenoj de tutarea plugado kaj de kultivaĵoj sur plugsulkoj".

La plej granda feliĉo en la vivo de Karl-Hermann Simon certe estis la renkonto kun fraŭlino Ingeborg Ehrlich, kiun li 1955 edziĝis. Ek de tiam ŝi estas fidela kunulino sur lia flanko en ĉiuj situacioj de la vivo. Ŝi forte subtenis sian senlace laborantan edzon, farintajn multspecajn taskojn, kiujn li ŝarĝis sur sin iom post iom. Ilaj kvar infanoj Karl-Heinz (1956), Renate (1957), Birgit (1960) kaj Katrin (1963) estis por ambaŭ neelĉerpebla fonto de energio.

En la jaro 1959 Karl-Hermann Simon doktoriĝis pri "Artefarita grundokovrado de pinokultivaĵoj, precipe konsiderante la mikroklimaton". De 1953 ĝis 1991 li laboris en la Instituto pri Meteologio de la Forstscienca Fakultato Eberswalde, poste en la sekcio Arbarekologio/Hidrologio de la Instituto pri Forstaj Sciencoj respektive Esplorinstituto pri Arbar- kaj Lignomastrumado Eberswalde. Karl-Hermann Simon komencis sian karieron kiel scienca aspiranto. Ekde 1962 li estis okupita kiel scienca kunlaboranto kaj ekde 1987 kiel estro de la fako Forsta Hidrologio kaj kiel vic-sekciestro.

Lia esplora agado unue ampleksis antaŭ ĉio forstmeteologiaj kaj arbarero-klimataj aspektoj. Tiu laboro translokiĝis komence de la 70aj jaroj al la kampo de la forsthidrologio. En Britz proksime de Eberswalde estiĝis sub gvido de d-ro Simon grandlizometro, kiu tiam estis la plej granda en Eŭropo.

Sed la profesiaj devoj povis ne tute plenumi tiom aktivan genion kiel Karl-Hermann Simon. En la 70aj jaroj de la pasinta jarcento li malkovris por si la allogon kaj ĉarmon sed ankaŭ la povon de la planlingvo Esperanto. Ĝi montris al li la elstaran eblecon, fare de unu lingvo interkompreniĝi mondwide, kvazaŭe ĉesigi la ĥaoson de Babilono – kia fascina ideo!

Tial li utiligis grandan parton de sia povo nacie kaj internacie pledi por tiu ĉi ideo. En la jaro 1978 li fariĝis membro de la Esperanto-Asocio de GDR kaj fondis 1981 la societeton

“Internacia Forstista Rondo Esperantlingva”, kiu celas la sciencan verkadon de la forstfaka terminologio en Esperanto. Tiu ĉi terminologia agado – komence limigita je la germana lingvo kaj Esperanto – poste vastigitaj je pliaj lingvoj. D-ro Simon naskigis “Lexicon silvestre” kaj kolektis ĉirkaŭ si progrese kreskintan nombron da lingvoekspertoj, lingvointeresuloj kaj forstistoj, dissemintaj tra la tuta mondo. 1982 li fontis la periodan revuon “Forstista Informilo” (FI), kiun li redaktis kaj eldonis ĝis la jaro 2008. Aperanta ĝis nun, ĝi estas la komunikada platformo por ĉiuj kunlaborantoj, agadantoj pri la forstfaka terminologio. 1994 d-ro Simon eldonis la unuan volumon (prima pars eo) de “Lexicon silvestre”. Rapide sekvis pliaj volumoj. Post la reuniĝo de Germanio ekestis fare de lia iniciativo la Patrona Asocio “Lexicon silvestre” r. A., respondanta pri la preparado kaj eldonado de la leksikono pri la forstfaka terminologio (“Lexicon silvestre”).

Longa vivo, plena de laboro kaj sukceso, nun troviĝas malantaŭ Karl-Hermann Simon – ni riverencas antaŭ li kaj elkore gratulas!

el la germana esperantigis: Ingward Ullrich

### Publikaĵoj:

- 1958: Untersuchungen zur künstlichen Bodenbedeckung in Kiefernkulturen unter besonderer Berücksichtigung des Mikroklimas. Diss. Forstes. Fak. Eberswalde, 157 S. + Anh.
- 1959: Zur Bedeckung von Kiefernkulturen mit Spänen. Forst und Jagd 9 376-377
- 1960: Einige Bemerkungen zur mikrometeorologischen Meßtechnik. Angew. Meteorologie 312, 362-368
- 1960: Untersuchungen zur künstlichen Bodenbedeckung in Kiefernkulturen unter besonderer Berücksichtigung des Mikroklimas. Arch. Forstwes. 92, 109-135
- 1961: Die Auswertung eines Kiefernkulturversuches mit Hilfe der mehrfachen Varianzanalyse bei ungleicher Besetzung der Untergruppen mit Beobachtungen. Biometr. Zeitschr. 3(1961)2, 92-112
- 1967: Messung und Abschätzung der nächtlichen Tiefsttemperaturen auf einer Wiederaufforstungsfläche. Arch. Forstwes. 16(1967)6/9, 653-658
- 1968: Zur Bestimmung des Wasserhaushaltes von Kiefernbeständen auf zwei Sandstandorten mit Hilfe der Neutronensonde. V.T. Hydrometeorologie 1968, 303-311
- 1968: Die Zusatzberechnung in Forstbaumschulen (eine vorläufige Information für die Leiter der Forstbaumschulen der DDR), Beitr. f. d. Forstwirtschaft. 2(1968) 9-18
- 1968: Zur Abschätzung der Spätfrostgefährdung von Wiederaufforstungsflächen. Arch. Forstwes. 17(1968)3, 329-342
- 1970: Der Bau von Unterflurlysometern im Walde. 16mm-Film s/w, 25 min. EFI-Studio 1970
- 1971: Zur Frage der Hitzeschäden bei der Sämlingsanzucht. Beitr. f. d. Forstwirtschaft. 5 (1971)3, 145-147
- 1972: Hydrologische Untersuchungen zur Bilanzierung des Wasserhaushalts von Kiefernbeständen im norddeutschen Flachland. Arch. Naturschutz u. Landschaftsforsch. 12(1972)12, 13-36, mit LÜTZKE, R.
- 1972: Zum Einsatz der Berechnung bei der Sämlingsanzucht in Forstbaumschulen. Beitr. f. d. Forstwirtschaft. 6(1972)3, 7-15, mit SCHUBERT, J.
- 1973: Der Bau von Großlysometern. 16mm-Film s/w, 20 min. EFI-Studio 1973
- 1975: Zur Steuerung der Berechnung in Forstbaumschulen. Beitr. f. d. Forstwirtschaft. 9(1975)2, 63-67, mit SCHUBERT, J.
- 1975: Zur Bilanzierung des Wasserhaushalts von Waldbeständen auf Sandstandorten der DDR. Beitr. f. d. Forstwirtschaft. 9(1975)1, 5-12, mit LÜTZKE, R.
- 1975: Zum Einsatz der Berechnung bei der Verschulpflanzenanzucht von Forstgehölzen. Beitr. f. d. Forstwirtschaft. 9(1975)1, 19-24, mit SCHUBERT, J.
- 1976: Großlysometer aus Plaste zur Bilanzierung des Wasserhaushaltes von Waldbestockungen. Beitr. f. d. Forstwirtschaft. 10 (1976), 23-27, mit LÜTZKE, R.;
- 1978: Zur Erfassung der Sickerwassermengen für die Bilanzierung des Wasserhaushaltes von Waldbeständen mit Hilfe des Tracerverfahrens. Beitr. f. d. Forstwirtschaft. 12(1978)4, 183-187, mit RITTER, G.
- 1981: Untersuchungen mit Großlysometern zur Grundwasserneubildung und zum Stoffgehalt des Sickerwassers unter Forstkulturen auf Sandböden. Beitr. f. d. Forstwirtschaft. 15(1981)1, 19-23,


- mit LÜTZKE, R.;
- 1981: Über die Bilanzierung des Wasserhaushalts einiger Waldstandorte im Flachland der DDR (eo). AEST' 81. Kol. de ref. 1(1981) 95-100, mit RITTER, G. & LÜTZKE, R.
- 1982: Al kelkaj energiproblemoj el la vido de la arbarmastrumado, in Raciigo en scienco kaj tekniko, SAEST' 82., Prag, S.20 – 25, mit KUTZ, J.
- 1984: Über die Abschätzung der Gefährdung von landwirtschaftlichen Flächen durch Spätfröste (eo). AEST' 84. Kol. de ref. 1984, 31-39
- 1985: Wasserhaushaltsbilanz für einen Fichtenbestand im mittelböhmischen Hügelland. Beitr. f. d. Forstwirtsch. 19 (1985) 2, 65-69, mit RITTER, G.; MRÁZ, K.
- 1985: Zur Abschätzung der Spätfrostgefährdung von landwirtschaftlichen Nutzflächen. Peterm. Geogr. Mitt. 129(1985)3, 177-180
- 1988: Zur Frostgefährdung des Forstbotanischen Gartens. In-. Führer durch den Forstbotanischen Garten 1988. S. 16-20. (Hrsg.: Inst. f. Forstes. Eberswalde)
- 1988: Al la raciigo de terminologia kaj vortara laboroj, in Raciigo en scienco kaj tekniko, Poprad, S.136 - 140
- 1990: Ergebnisse von Depositionsmessungen in Waldgebieten des Tieflandes der DDR. Beitr. f. d. Forstwirtsch. 24(1990)3, 109-112, mit WESTENDORFF, K.
- 1990: Vorschlag zur Klassifizierung von Termini auf dem Gebiet des Forstwesens. Beitr. f. d. Forstwirtsch. 24(1990),3, 146-147, mit ULLRICH, I.; PLUQUET, E.
- 1990: Rezension von "Swank, W.T. e.a.: Forest hydrology at Coweeta. Springer-Verlag New York 469 p. " in: Beitr. f. d. Forstwirtsch. 24(1990)3, 142-243
- 1991: Auswirkung von Luft-, Wasser- und Bodenkontaminationen auf Wälder. Umweltbundesamt Forschungsbericht 1991, 100 S., mit e.a.
- 1991: Stoffeinträge mit dem Niederschlag in Kiefernbeständen des nordostdeutschen Tieflandes in den Jahren 1985-1989. Beiträge f. d. Forstwirtsch. 21(1991)4, mit WESTENDORFF, K.
- 1991: Ergebnisse von Depositionsmessungen im Wald. In: Deposition atmosphärischer Spurenstoffe - Ergebnisse mehrjähriger Untersuchungen in der DDR. Red.: Möller, D. Berlin 1991, mit WESTENDORFF, K.
- 1995: "Lexicon silvestre" - novspeca eldono en la forstfaka literatura, in La stato kaj estonteco de la internacia lingvo Esperanto, Prag, S. 98, mit ULLRICH, I.; WECKWERTH, H.
- 2001: Erfahrungen bei der terminologischen Bearbeitung der forstlichen Fachsprache, Sprachenpolitik in Europa, Berlin, S. 146 – 157, mit ULLRICH, I.
- 2001: On the International Language Communication in the Field of Forestry, in Informilo por Interlingvistoj, Rotterdam, S. ?, mit MARINOV, B., D.; ULLRICH, I. & WECKWERTH, H.
- 2002: Erfahrungen mit Normtermini in Esperanto, in Plansprachen und ihre Gemeinschaften, Berlin, S. 115 – 122, mit WECKWERTH, H.; WEIDNER, K.-P.
- [RED]
- 1995: Lexicon silvestre, Słownik leśnictwa, Część polska (I/pl), S. 53
- 1996: Lexicon silvestre, Wörterbuch des Forstwesens, Deutscher Teil (I/de) mit Definitionen, S. 118
- 1996: Lexicon silvestre, Dictionnaire de foresterie, Version française (I/fr/2) avec des définitions, S. 125
- 1997: Lexicon silvestre, Vortaro de forsta fako, Esperantlingva versio (I/eo/2) kun difinoj, S. 84
- 1997: Lexicon silvestre, Wörterbuch des Forstwesens, Deutsche Version (I/de/3) mit Definitionen, S. 95
- 1997: Lexicon silvestre, Dictionary of Forest Affairs, English Version (I/en/2) with Definitions, S. 125
- 1997: Lexicon silvestre, Dicționar forestier, Versio română (I/ro/1), S. 52
- 1997: Lexicon silvestre, Šumarski riječnik, Hrvatski dio (I/hr/1), S. 94
- 1997: Lexicon silvestre, Ormancılık Terimleri Sözlüğü, Bölüm (I/tr/1) (Açıklamalı), S. 58
- 1998: Lexicon silvestre, Vortaro de forsta fako, Esperantlingva versio (II/eo/1) kun difinoj, S. 82
- 1998: Lexicon silvestre, Wörterbuch des Forstwesens, Deutsche Version (II/de/1) mit Definitionen, S. 117
- 1999: Lexicon silvestre, Vortaro de forsta fako, Esperantlingva versio (III/eo/1) kun difinoj, S. 97
- 1999: Lexicon silvestre, Wörterbuch des Forstwesens, Deutsche Version (III/de/1) mit Definitionen, S. 144
- 1999: Lexicon silvestre, Dictionnaire de foresterie, Version française (II/fr/1) avec des définitions, S.

120

- 1999: Lexicon silvestre, Lesnický slovník, Česká verze (II/cs/1) s definicemi, S. 98
- 2000: Lexicon silvestre, Wörterbuch des Forstwesens, Deutsche Version (I/de/4) mit Definitionen, S. 100
- 2000: Lexicon silvestre, Vortaro de forsta fako, Esperantlingva versio (II/eo/2) kun difinoj, S. 87
- 2000: Lexicon silvestre, Wörterbuch des Forstwesens, Deutsche Version (II/de/2) mit Definitionen, S. 151
- 2000: Lexicon silvestre, Vortaro de forsta fako, Esperantlingva versio (IV/eo/1) kun difinoj, S. 103
- 2000: Lexicon silvestre, Wörterbuch des Forstwesens, Deutsche Version (IV/de/1) mit Definitionen, S. 163
- 2001: Lexicon silvestre, Vortaro de forsta fako, Esperantlingva versio (I/eo/3) kun difinoj, S. 107
- 2001: Lexicon silvestre, Dictionary of Forest Affairs, English Version (II/en/1) with Definitions, S. 164
- 2001: Lexicon silvestre, Dictionnaire de foresterie, Version française (III/fr/1) avec des définitions, S. 151
- 2001: Lexicon silvestre, Vortaro de forsta fako, Esperantlingva versio (V/eo/1) kun difinoj, S. 115
- 2001: Lexicon silvestre, Wörterbuch des Forstwesens, Deutsche Version (V/de/1) mit Definitionen, S. 194
- 2001: Lexicon silvestre, Лесной Словарь, Русская версия (I/ru/1) с дефинициями, S. 97
- 2002: Lexicon silvestre, Wörterbuch des Forstwesens, Deutsche Version (IV/de/2) mit Definitionen, S. 192
- 2002: Lexicon silvestre, Dictionnaire de foresterie, Version française (IV/fr/1) avec des définitions, S. 167
- 2002: Lexicon silvestre, Lesnický slovník, Česká verze (I/cs/3) s definicemi, S. 113
- 2002: Lexicon silvestre, Lesnický slovník, Česká verze (II/cs/2) s definicemi, S. 119
- 2002: Lexicon silvestre, Gozdarski slovar, Slovenski verze (I/sl/1) z definicijama, S. 61
- 2002: Lexicon silvestre, Meža nozares vārdnīca, Latviskā versija (I/lv/2), S. 51
- 2002: Lexicon silvestre, Metsanduslik sõnaraamat, Eestikeelne osa (I/et/1) koos seletustega, S. 61
- 2003: Lexicon silvestre, Wörterbuch des Forstwesens, Deutsche Version (III/de/2) mit Definitionen, S. 151
- 2003: Lexicon silvestre, Wörterbuch des Forstwesens, Deutsche Version (V/de/2) mit Definitionen, S. 151
- 2003: Lexicon silvestre, Dictionnaire de foresterie, Version française (V/fr/1) avec des définitions, S. 194
- 2003: Lexicon silvestre, Vortaro de forsta fako, Esperantlingva versio (VI/eo/1) kun difinoj, S. 81
- 2003: Lexicon silvestre, Wörterbuch des Forstwesens, Deutsche Version (VI/de/1) mit Definitionen, S. 131
- 2003: Lexicon silvestre, PJESA E PARE, Fjalor i pylltarise, Versioni shqip (I/sq/1) me definicionet, S. 76
- 2004: Lexicon silvestre, Wörterbuch des Forstwesens, Deutsche Version (I/de/5) mit Definitionen, S. 145
- 2004: Lexicon silvestre, Vortaro de forsta fako, Esperantlingva versio (VII/eo/1) kun difinoj, S. 87
- 2004: Lexicon silvestre, Wörterbuch des Forstwesens, Deutsche Version (VII/de/1) mit Definitionen, S. 140
- 2005: Lexicon silvestre, Wörterbuch des Forstwesens, Deutsche Version (VIII/de/1) mit Definitionen, S. 148
- 2005: Lexicon silvestre, Dictionnaire de foresterie, Version française (VI/fr/1) avec des définitions, S. 118
- 2007: Lexicon silvestre, Słownik z zakresu terminologii leśnictwa, Część polska (I/pl/1) z definicjami, S. 46

### **Esenca partopreno en sekvaj esplor-raportoj de la esplorinstituto Eberswalde**

- 1958: Untersuchung der Einwirkung verschiedenartiger Bodenbedeckung in Kamp und Freikultur auf das Mikroklima und auf das Gelingen der Forstkulturen. 1958, 164 S. + Anh.
- 1962: Forstmeteorologische Untersuchungen zur Kartierung der Frostgefährdung. 1962, 46 S. + Anh.
- 1965: Voruntersuchungen über die Möglichkeit einer Kartierung frostgefährdeter Lagen vom Flugzeug aus. 1965, 32 S. + Anlagenbd.
- 1969: Verdunstung und Grundwasserneubildung. 1969, 75 S. + Anlagenbd.
- 1970: Zum Einsatz der Beregnung bei der Sämlingsanzucht von Forstgehölzen. 1970, 93 S. + Anlagenbd.
- 1971: Wasserhaushalt und Produktivität. 1971, 77 S. + Anh.
- 1975: Beregnung bei der Verschulpflanzenanzucht. 1972, 18 S. + Anh. Methodische Untersuchungen zur Bilanzierung des Wasserhaushalts von Waldbeständen. 1975, 20'S. + Anh.
- 1976: Untersuchungen zum Gesamtwasserhaushalt von landwirtschaftlichen und forstlichen Kulturen (Lysimetermessungen). 1976, 20 S. + Anlagenbd.
- 1980: Hydrologische Grundlagen für Kennwerte zur Intensivierung der wasserwirtschaftlichen Leistungen der Wälder. 1980, 15 S. + Anh.
- 1980: Erarbeitung von Bilanzen des Wasserhaushalts von landwirtschaftlichen Beständen und Forstkulturen. 1980. 48 S. + Anh.
- 1983: Einfluss der Forstdüngung auf die Wassergüte. 1983, 54 S. + Anh.
- 1984: Wissenschaftliche Grundlagen für Anlage und Bewirtschaftung von Plantagen mit schnellwachsenden Nadelbaumarten und anerkannten Sorten. 1984, 53 S. + Anh.
- 1984: Hydrologische Kennwerte zur Intensivierung der wasserwirtschaftlichen Leistungen der Wälder auf Sandböden des Tieflands.. 1984, 11 S. + Anh
- 1986: Verfahren zur Anlage und Bewirtschaftung von Hochleistungsplantagen mit Pappeln zur Verwertung von Abwasser und zur zusätzlichen Holzproduktion. 1986, 13 S. + Anh.
- 1986: Bilanzen des Gesamtwasserhaushalts von forstlichen und landwirtschaftlichen Beständen. 1986, 78 S. + Anh.
- 1988: Forsthydrologische Untersuchungen zum Stoff- Ein- und -Austrag in Waldbeständen des Tieflandes. 1988, 30 S. + Anh.



Je la 11a de julio 2010 okazis la solena libro-transdono en la loĝejo de d-ro K.-H. Simon. Ĉi tie d-ro Blanke oficiale transdonas la libron, eldonita honore al d-ro Simon. En la fono sinjorino Ingeborg Simon.

*Foto: Stefan Panka*

## Karl-Hermann Simon. *Lexicon silvestre* - Beiträge zum multilingualen Wörterbuch des Forstwesens. Kontribuoj pri la multlingva vortaro de la forstfako

Klaus Schubert<sup>1</sup>



Grandaj atingoj estiĝas per mensa reflektado de la propra agado. Ĉi tiu libro spegulas gravan parton de la intelekta laboro de Karl-Hermann Simon kaj la fakuloj ĉirkaŭ li. Hodiaŭ la frukto de ilia komuna laboro ekzistas: *Lexicon silvestre*, la monumenta vortaro de la forsta fako. Fone de tia ampleksa multlingva fakvortaro nepre troviĝas vasta, zorgeme organizita terminologia laborprojekto gvidita per profunda scienca kaj faka scio.

La terminologio estiĝis kiel aparta disciplino ene de la aplika scienco antaŭ preskaŭ centoj da jaroj. En tiu periodo la noviga ideo de la industria normigo kaj la optimumiga ideo de la konstruado de planlingvoj konektiĝis kaj naskis la terminologion kiel specon de

optimumiga normigo de la lingvo.

La objekto de la terminologia normigo estas la fakaj lingvoj. La aplika lingvistiko nomas fakaj lingvoj tiujn variaĵojn de la lingvo, kiuj akompanas, gvidas kaj dokumentas fakajn agadojn. Fako estas io, kion ni kapablas ekregi nur per lernado. Tio povas esti lernado per imito aŭ per organizita instruado aŭ studado. Lernado implicas komunikadon, kaj komunikado pri fako premias fakajn lingvojn. Por ke io povu establiĝi kiel fako, ĝi nepre devas esti sistemigita kaj ordigita per intelekta laboro. Nur per tio ĝi fariĝas instruebla kaj nur per tio ĝi fariĝas fako.

La tasko de la terminologoj estas ordigi konceptojn en konceptaj sistemoj, klare difini ilin kaj elekti aŭ krei la terminojn. Per tio, la terminologio ne estas nura akompana kromafero apud la faka laboro, sed ĝi estas nemalhavebla ekzistopremiso de la fako, kiu donas al la fako ties pensostrukturon. La terminologio tamen ne havas la liberecon decidi kaj difini arbitre. Faka scio kaj faka lingvo estas sociaj posedaĵoj, kiujn ne eblas funde redifini. Tio estas esenca empiria rezulto de la interlingvistiko – studebla ekzemplo per komparo de Volapuko, arbitre stirita kaj post mallonga kresko pereinta, kontraste al Esperanto, evoluanta per samrajta socia partopreno de la lingvouzantoj.

*Lexicon silvestre* kaj malantaŭ ĝi Karl-Hermann Simon kaj lia teamo povas fieri pri granda atingo. Ili tion povis atingi per enorma komuna diligenteco, sed ne malpli per bone motivita strategia decido farita komence de la projekto, per kio ili elektis Esperanton kiel centran lingvon de la tuta laboro.

originale Esperanto de. K. Schubert

## Ĝenerala jarkunveno de la gemembroj de Patrona Asocio „Lexicon silvestre“ r.A.

de Stefan Panka

Karaj gesamideanoj, kiel ĉiujare tiutempe ni renkontiĝas en Eberswalde por kune diskuti pri la aktivaj agadoj, pri la atingoj kaj ankaŭ pri niaj problemoj kaj estontaj projektoj. Ĉiu opinio kaj ĉiu kontribuo estas tre grava al ni. Tial mi kore dankas ĉiujn geanojn, venintajn al Eberswalde. Mi precipe ankaŭ dankas tiujn, al kiuj pro malsaneco aŭ aliaj gravaj kaŭzoj ne eblas partopreni la longe antaŭe fiksitan daton, sed kiuj fare de sia kunlaboro forte akcelas nian komunan projekton. Ĉi-loke mi ŝatas aparte reliefigi la senlacan agadon de nia estimata Ingward Ullrich. Li klopodas akceladi nian verkon spite al sia malfortigita saneco. Dank` al liaj celkonscio kaj scio sur la kampo de la Esperanto-terminologio eblis, fine ĉesigi la laboradon

<sup>1</sup> Prof. D-ro. phil. habil. Klaus Schubert, Universitato de Hildesheim, Instituto pri Tradukologio kaj Faka Komunikado, Marienburger Platz 22, D-31141 Hildesheim; <http://www.klausschubert.de>

pri la 9a volumo (naŭa pars de/eo I) de "Lexicon silvestre" (vd. protokolo pri la ĝenerala jarkunveno 2010) kaj realigi la revizion de antaŭaj ekzempleroj de "Forstista Informilo". Dank' al la subteno de s-ino Lilianne Meier, s-ro Ullrich povis pliampeksigi sian verkon "Nomenklatura florum lignearum silvestris Europae" je pliaj lingvoj kaj publikigi ĝin kvinlingva kiel 3a eldono en nia eldonejo Patrona Asocio "Lexicon silvestre" r. A. antaŭ jarfino 2009. Venontjare s-ro Ingward Ullrich maljuniĝas je 80 jaroj kaj li ne fariĝas tedita de sia laborado. Nur malmultuloj scias, ke tiu modesta forstisto ankaŭ havas aliajn interesojn (FI 58/2010). Interalie li estas aŭtoro de porinfana literaturo. En tiu ĉi jaro li ankaŭ publiciis sian ĉarme verkitan fabelolibron "La magia violono kaj aliaj fabeloj".

Multan dankon mi ankaŭ ŝuldas al s-ro Horst Weckwerth, s-ino Lilianne Meier kaj s-ino Clivia Panka. Sen ilia kompetenta kunlaboro ne eblus aperigi pliajn eldonojn de "Forstista Informilo" anglalingve kaj akceli la konformigon de la franca versio de Ls al MediaWiki-datenbanko. Ĉi-loke mi esprimas elkoran dankon al ĉiuj aliaj anoj pro ilia kunlaboro! Optimisme ni povas rigardi al la estonteco, se ni sukcesas meti la taskojn en la manojn de multaj gemembroj!

el la germana esperantigis: Ingward Ullrich

## Protokolo

**pri la membrokunveno de Patrona Asocio „Lexicon silvestre“ r. A. je 2009-10-6, 16a horo en la domo de Forstbotanika Ĝardeno Eberswalde, Am Zainhammer 5, 16225 Eberswalde**

---

Tagordo:

1. Malfero kaj bonvenigo
2. Konstato pri la laŭregula invito, konstato pri la decidorajto
3. Interkonsiliĝo kaj voĉdonado pri la tagordo
4. Novaj gemembroj, eksiĝoj, aktuala nombro de gemembroj
5. Raporto de la asocia estraro (direkcia konsilio) – bilanca raporto (S. Panka)
6. Financa raporto (d-ro L. Blaško)
7. Raporto de la kasrevizoro (d-ro B. Götz)
8. Decido pri ŝanĝo de la statuto por akiri publikutilecon
9. Baloto de la nova asocia estraro
10. Aktualaj problemoj rilate la laboron pri "Lexicon silvestre"
11. Kromaj aferoj

Partoprenantoj:

D-ro Lubomir Blaško, d-ro Bernhard Götz, s-ino Lilianne Meier, s-ino Clivia Panka, s-ro Stefan Panka, d-ro Horst Weckwerth

Senkulpigitaj :

S-ro Jürgen Peters, s-ino Reiman, s-ro Ingward Ullrich

Gastoj:

S-ino Inge Simon, prof. d-ro habil. Tomasz Zawila-Niedzwiecki

- ad 1. Bonvenigo fare de Stefan Panka, prezidanto de la asocio
- ad 2. La invito laŭregule estis sendita; konstato pri decidorajto ekzistas
- ad 3. Konstato de la tagordo
- ad 4. ne ekzistas novaj gemembroj. 1 eksiĝo, 2 anoncoj pri morto. Aktuala nombro de la membraro: 27
- ad 5. Raporto pri la notaria dokumentado de la novaj statuto kaj afera regularo de la Asocio (09.10.2009) kaj

**Raporto pri la aktivoj de la Asocio en la jaro 2010 (bilanca raporto)**

Alkonformigo kaj sekurigo de datenoj por MedivaWiki-datenbanko (cs1, de1, de2, eo1, eo2, fr1, pl1, ru1)

Eldono de Forstista Informilo n-ro 57 (2010-04-15). La Esperanto- kaj anglalingvaj versioj povis sekurigataj fare de s-ro F. GÄDIKE, s-ino L.C. MEIER, s-ino C. PANKA kaj s-ro I. ULLRICH.

Aperigo de la 3a eldono de NOMENCLATURA FLORAE LIGNEAE SILVESTRIS EUROPAE, kvinlingva (scienc-latina, Esperanto, germana, angla, franca), aŭtoro: Ingward Ullrich.

Eldono de la unua volumo de la trilingva versio de LEXICON SILVSTRE (Esperanto, germana, pola).

Eldono (D. BLANKE & S. PANKA) de jubilea publikaĵo honore al d-ro Karl-Hermann SIMON okaze de lia 80a naskiĝtago.

Fino de la prilaborado de la 9a volumo (nona pars) en Esperanto (s-ro I, ULLRICH).

Fondo de Asocia biblioteko.

Ellaborado kaj forsendo de oferto pri niaj aktualaj presaĵoj; tie estas atentigata, ke libroj estas presataj nur malgrandserie kaj nur laŭmende.

Pliampleksigo de informa oferto en Vikipedio.

Por realigi nian MediaWiki-projekton financaj investoj necesas (nuntempe ĉ. 1800 Eŭr., 1HE Intel Core i7 Rack Server 1430,00 Eŭr., DIGITUS 48,3 cm 19 coloj Servilŝranko 85,00 Eŭr., programada faro ĉ. 200,00 Eŭr.). La financaj rimedoj momente ne estas je dispono.

ad 6. **Financa raporto**

La prizorgado de la financoj okazis fare de L. BLAŠKO kaj S. PANKA. La jarfina bilanco 2009 kaj la prezentado de la respektivaj dokumentoj al la financoficejo okazis ĝis la fiksita dato. La jam ĉe la lasta jarkunveno preparoligita problemo rilate la ŝarĝigon de la Asociaj financoj per la seninteresa monpruntaĵo, kiu estis donita al la Asocio inter 1994 ĝis 2006 fare de la asociaj anoj SIMON, WECKWERTH, kaj ULLRICH, estas vaste solvita per la komplezo de la anoj SIMON kaj ULLRICH. Ĉe la asocia estraro ekzistas skribaj deklaroj de la lastnomitoj, per kio estas senŝarĝigita la Asocio. Restas nur monpruntaĵo de d-ro WECKWERTH.

La financa resumo (stato oktobro 2010) montras monhavaĵon de 813,10 Eŭr. kaj enspezoj de 1700,- Eŭr. (125,- Eŭr. membrototizoj, 215,- Eŭr. mondonacoj, 1000,- Eŭr. subtenaj monrimedoj, 360,- Eŭr. librovendado). Al tio kontraŭstaras elspezoj de 2010,81 Eŭr. (1955,13 Eŭr. libropresado, 27,95 Eŭr. poŝtmarkoj/pakumo, 27,73 Eŭr. kostoj por kontotenado). El tio rezultas kuranta konto de 502,29 Eŭr. Al tio kontraŭstaras seninteresa monpruntaĵo de -519,91 Eŭr. (H. WECKWERTH). La mankaso estis likvidita je 2010-07-02. Ĝi servis unuavice al sekurigo de ĝis nun plenumitaj MAE-aranĝoj.

ad 7. La dokumentoj estis transdonita al la kasrevizoro B. GÖTZ por kontrolo. Li konfirmis laŭordan kastenadon. Poste oni voĉdonis pri la senŝarĝigo de la estinta asocia estraro (PANKA, BLAŠKO, SPANGENBERG). Rezulto de la voĉdono: unuanima senŝarĝigo de la estraro, neniam sindetenoj, neniam kontraŭaj voĉoj.

ad 8. Decido pri ŝanĝo de la statuto (diklitera teksto) por akiri publikutilecon: Rezulto de la voĉdono: unuanima – neniam sindetenoj, neniam kontraŭaj voĉoj.

ad 9. Rilate la baloton de la nova asocia estraro estas proponata:

kiel prezidanto: Stefan PANKA  
kiel vicprezidanto: Lubomir BLAŠKO  
kiel trezoristo: Bernhard GÖTZ

Oni pridemandas la proponitajn personojn, ili disponigas sin al la baloto.

La baloto okazas unuanime – neniam sindetenoj, neniam kontraŭaj voĉoj.

La elektitoj akceptas la elektiĝon.

Kiel kasrevizoro s-ino Clivia PANKA estis konfirmata fare de la kunvenintaj personoj.

ad 10. Pensoj, kiel plimultigi la nombron de honorificaj kunlaborantoj.

ad 11. – –



## Aldono 1

### **Statuto de la publikutila Patrona Asocio „Lexicon silvestre“ r. A.**

---

1. Nomo kaj sidejo de la Asocio
- 1.1. La Asocio havas la nomon “Patrona Asocio ‘Lexicon silvestre’ r. A.” (Förderverein ‘Lexicon silvestre’ e. V.”).
- 1.2. La Asocio havas sian sidejon en Eberswalde. Ĝi estas enskribita en la asocian registron.
2. Celo de la asocio
- 2.1. La celo de la asocio estas subteni la sciencan laboron pri la verko “Lexicon silvestre”. Ĉi tiu verko estas datenbanko pri la terminologio forstfaka. La verko estiĝas baze de internacia kunlaborado de forstistoj kun aliaj fakuloj. La egalrajteco de ĉiuj lingvoj estas neforigebla bazo de ĉi tiu komuna projekto.
- 2.2. Ĉi-rilate la Asocio subtenas ĉiujn paŝojn, direktitajn al internacia kunlaborado.
- 2.3. La Asocio intencas ekskluzive kaj rekte publikutilajn celojn sence de la paragrafo “impostofavorataj celoj” kaj agas altruisme, ne intencante realigi memekonomian profitaĵon.
- 2.4. La monrimedoj de la Asocio estu uzataj nur por celoj laŭstatutaj. Gemembroj de la asocio ne ricevu gratifikaĵojn el la fonduso de la Asocio.
- 2.5. Neniu persono estu privilegiata per troa kompensado aŭ per elspezoj kontraŭaj al la celo de la Asocio.
3. Agado de la Asocio  
La agado de la Asocio reguliĝas surbaze de ĉi tiu statuto per la Asocia Afera Regularo. La lasta validas kompletigante al la statuto kaj al individuaj kontraktaj reguligoj. La Asocia Afera Regularo estu decidita de la membrokunveno.
4. Membreco
- 4.1. Naturaj personoj, kiuj aprobas la statuton, povas fariĝi gemembroj de la Asocio. Rajto pri akcepto ne ekzistas.
- 4.2. La membreco komenciĝas tiam, kiam la asocia estraro aprobis la aliĝdeklaron.
- 4.3. La membreco finiĝas kaŭze de ekziĝo aŭ morto de la membro aŭ fare de ties ekskludo deklarita de la asocia estraro. La koncernaj membroj rajtas kontraŭdiri la ekskludon (forme de mocio) antaŭ la membrokunveno. Ĝi definitive decidas pri la afero.
- 4.4. Membroj ĉeestantaj la kunvenon havas po unu voĉo kaj povas fari mociojn. Tiamaniere ili rajtas kaj uzas la eblecon aktive influi la evoluon de la Asocio kaj ĝiajn celojn.
- 4.5. Personoj, precipe meritplenaj pro la Asocio, de la membrokunveno povas esti nomitaj honoraj membroj. Ili havas la samajn rajtojn kiel la ordinaraj membroj – escepte de la kotiza regularo.
5. Financaj rimedoj
- 5.1. La financaj rimedoj de la Asocio rezultas el membrokotizoj kaj mondonacoj.
- 5.2. La kvanto kaj la pagodato de la kotizoj reguliĝas per la Asocia Afera Regularo.
6. Organoj de la Asocio
- 6.1. Organoj de la Asocio estas
  - la membrokunveno
  - la asocia estraro
- 6.2. Por progresigi la asocian laboron la estraro rajtas instali fakajn komisionojn.
7. Membrokunveno
- 7.1. La membrokunvennon principe prezidas la prezidanto de la Asocio aŭ de li destinita anstataŭanto.
- 7.2. Mocioj al la membrokunveno  
Mocioj estu konataj ne pli malfrue ol ĉe la fiksado de la tagordo.
- 7.3. La membrokunveno decidas pri la definitiva tagordo.
- 7.4. Pri ĉiuj membrokunveno kaj estrarkunsido protokoloj pri decidoj estu faritaj kaj akceptitaj de la

respektiva membrokunvenintaro per simpla plimulto. La protokoloj estu faritaj de protokolanto kaj subskribitaj de li kaj unu estrarano.

- 7.5. Al la taskoj de la membrokunveno apartenas antaŭrange
  - la elekto kaj la malelekto de la asocia estraro
  - la elekto de la kasrevizoro/kasrevizorino
  - la akcepto de la jar-raporto (bilanca raporto) de la asocia estraro
  - la senŝarĝigo de la asocia estraro
  - la decido pri eventuala ŝanĝo de la Asocia Afera Regularo
  - la decido pri ŝanĝo de la Asocia Statuto
  - la decido pri malfondo de la Asocio
- 7.6. La membrokunveno estas kunvokenda
  - se la intereso de la Asocio necesigas tion, sed minimume unu fojon dum la kalendara jaro
  - se minimume 20 % de la membraro postulas tion per skribaj mocioj. Ĉi-kaze la asocia estraro kunvoku la membrokunvenon ene de la daŭro de 14 tagoj kaj fiksu ties daton ne pli malfrue ol 6 semajnoj post la efika postulo.
- 7.7. La asocia estraro kunvoku la membrokunvenon skribe, observante tempolimon de minimume 4 semajnoj kaj informante pri la tagordon. La limdato komenciĝas je la tago sekvonta la forsendon de la invitskribaĵoj. Sciigoj de la Asocio al la gemembroj estas rigardataj ricevitaĵoj, se ili estis forsenditaj sub la last-tempa adreso sciigita al la estraro.
- 7.8. Ĉiu membrokunveno, kunvokita laŭregule, estas decidpova.
- 7.9. La partoprenantoj de membrokunveno voĉdonas per levita mano. En voĉdonado la simpla plimulto estas decida. La malelekto de la estraro, la ŝanĝoj de la statuto kaj la malfondo de la Asocio estas decidopovaj sole per dutriona plimulto de la validaj voĉoj. La asocianoj dum membrokunveno nomumas balot-direktanton, kiu realigas la baloton de la estraro.
8. Asocia estraro
- 8.1. La asocia estraro konsistas el 3 personoj (prezidanto, vicprezidanto, trezoristo). Minimume du estraranoj rajtas agi kune nome de la estraro.
- 8.2. La asocianoj dum membrokunveno balotas la asocian estraron je kvar jaroj.
- 8.3. Dum sia mandato la estraro povas esti malbalotita nur, se alia estraro estas balotita samtempe.
- 8.4. Se membro de la estraro eksiĝas antaŭtempe, la restintaj estraranoj komisiite alvokas estraranon anstataŭan. La alvoko estas aprobenda fare de la asocianoj dum la sekva membrokunveno.
- 8.5. Kun finiĝo de ies asocia membreco ankaŭ finiĝas la ofico de ties estraraneco.
9. Raporto(j)
- 9.1. La estraro faru ĝis la 31a de marto de ĉiu jaro pri la pasinta financa jaro la raporton pri la aktivecoj (bilanca raporto) de la Asocio kaj pri ties financoj (financa raporto).
- 9.2. La revizio de la jarfina bilanco (financa raporto) okazas fare de kasrevizoro/ kasrevizorinoj destinitaj de la ĉeestintoj de la membrokunveno.
10. Malfondo de la Asocio
- 10.1. Per decido de la asocianoj dum membrokunveno oni povas malfondi la Asocion.
- 10.2. Ĉe malfondo de la Asocio aŭ ĉe nuligo de la impostofavorataj celoj la posedaĵo de la Asocio estas transdonata al "Eberswalder Förderverein für Lehre und Forschung e.V.", kiu uzu ĝin senpere kaj ekskluzive por publikutilaj, bonfaraj aŭ ekleziaj celoj.
- 10.3. Se la asocianoj dum la membrokunveno ne decidus ion alian, la estraro funkcias kiel likvidanto.

Ĉi tiu statuto estas akceptita dum la membrokunveno je 2010-10-06.

lingve reviziis: Ingward Ullrich

**Nia libro-oferto**

Gb bindita  
 Ringh ringe broŝurita  
 Pb kartonita

ISBN	Bindaĵo	Eldona jaro	Titolo/subtitolo	Prezo
3-931 262 18-9	(Gb)	1997	Lexicon silvestre, Prima pars Ŝumarski rječnik, Hrvatski dio (I hr) a definicijama, 96 p. (kroata eldono, 1-a parto)	15,00 €
3-931 262 20-0	(Gb)	1997	Lexicon silvestre, Prima pars Dictionary of Forest Affairs, English Version (II/en/2) with Definitions. X, 125 p. (angla eldono, 1-a parto)	15,00 €
3-931 262 22-7	(Gb)	1997	Lexicon silvestre, Prima pars Ormancılık Terimleri Sözlüğü, Türkçe Bölüm (I tr) Açıklamalı, 58 p. (turka eldono, 1-a parto)	10,00 €
3-931 262 23-5	(Ringh)	1997	Lexicon silvestre, Prima pars Ormancılık Terimleri Sözlüğü, Türkçe Bölüm (I tr) Acıklamalı, 58 p. (turka eldono, 1-a parto)	10,00 €
3-931 262 26-X	(Pb)	1997	Lexicon silvestre, Prima pars Ŝumarski rječnik, Hrvatski verze (I/hr/1) s definicijama, 96 p. (kroata eldono, 1-a parto)	15,00 €
3-931 262 30-8	(Gb)	1998	Lexicon silvestre, Secunda pars Vortaro de forsta fako Esperantlingva versio (II/eo/1) kun difinoj. X, 82 p. (Esperanto-eldono, 2-a parto)	10,00 €
3-931 262 32-4	(Gb)	1999	Lexicon silvestre, Secunda pars Dictionnaire de foresterie, Version française (II fr) avec des definitions, 120 p. (franca eldono, 2-a parto)	15,00 €
3-931 262 34-0	(Gb)	1999	Lexicon silvestre, Tertia pars Wörterbuch des Forstwesens, Deutsche Version (III/de/1) mit Definitionen. X, 144 p. (germana eldono, 3-a parto)	15,00 €
3-931 262 35-9	(Ringh)	1999	Lexicon silvestre, Tertia pars Wörterbuch des Forstwesens, Deutsche Version (III/de/1) mit Definitionen. X, 144 p. (germana eldono, 3-a parto)	13,00 €
3-931 262 36-7	(Gb)	1999	Lexicon silvestre, Tertia pars Vortaro de forsta fako Esperantlingva versio (III/eo/1) kun difinoj. X, 97 p. (Esperanto-eldono, 3-a parto)	15,00 €
3-931 262 50-2	(Gb)	2001	Lexicon silvestre, Prima pars Лесной Словар, (I/ru/1) Русская версия с дефинициями, 99 p. (rusa eldono, 1-a parto)	15,00 €
3-931 262 56-1	(Gb)	2001	Lexicon silvestre, Tertia pars Dictionnaire de foresterie, Version française (III/fr/1) avec des définitions, 150 p. (franca eldono, 3-a parto)	20,00 €
3-931 262 59-6	(Gb)	2000	Lexicon silvestre, Prima pars (Ls) Esperantlingva versio (I/eo/3) kun difinoj. X, 107 p. (Esperanto-eldono, 1-a parto, 3-a prilaboro)	15,00 €
3-931 262 60-X	(Gb)	2001	Lexicon silvestre, Secunda pars Dictionary of Forest Affairs, English Version (II/en/1) with Definitions. X, 157 p. (angla eldono, 2-a parto)	20,00 €
3-931 262 60-X	(Ringh)	2001	Lexicon silvestre, Secunda pars Dictionary of Forest Affairs, English Version (II/en/1) with Definitions. X, 157 p. (angla eldono, 2-a parto)	20,00 €
3-931 262 62-6	(Gb)	2001	Lexicon silvestre, Quinta pars Vortaro de forsta fako Esperantlingva versio (V/eo/1) kun difinoj. X, 115 p. (Esperanto-eldono, 5-a parto)	15,00 €
3-931 262 67-7	(Gb)	2002	Lexicon silvestre, Prima pars Gozdarski slovar, Slovenski verze (I/sl/1) z definicijama, 61 p. (slovena eldono, 1-a parto)	15,00 €
3-931 262 72-3	(Gb)	2002	Lexicon silvestre, Quarta pars Dictionnaire de foresterie, Version française (IV/fr/1) avec des définitions, 167 p. (franca eldono, 4-a parto)	20,00 €
3-931 262 74-X	(Pb)	2003	Lexicon silvestre, Prima pars Fjalor i pylltarise Versioni shqip (I/sq/1) me definicionet, 76 p. (albana eldono, 1-a parto)	15,00 €
3-931 262 78-2	(Gb)	2003	Lexicon silvestre, Sexta pars Vortaro de forsta fako, Esperantlingva versio (VI/eo/1) kun difinoj. X, 81 p. (Esperanto-eldono, 6-a parto)	15,00 €
3-931 262 81-2	(Gb)	2003	Lexicon silvestre, Tertia pars Wörterbuch des Forstwesens, Deutsche Version (III/de/2) mit Definitionen. X, 151 p. (germana eldono, 3-a parto, 2-a prilaboro)	20,00 €
3-931 262 83-9	(Gb)	2003	Lexicon silvestre, Quinta pars Dictionnaire de foresterie, Version française (V/fr/1) avec des définitions, 194 p. (franca eldono, 5-a parto)	20,00 €

## Nia oferto



**DETLEV BLANKE, STEFAN PANKA (2010, EDIT.):**  
**KARL-HERMANN SIMON. LEXICON SILVESTRE –**  
 Beiträge zum multilingualen Wörterbuch des  
 Forstwesens. Kontribuoj pri la multlingva vortaro  
 de la forstfako.

Unuafoje la libro montras en grandskala formo, kia estas la valoro de la terminologia laboro de la forstsciencisto kaj leksikografo Karl-Hermann Simon kune kun lia grupo de fakuloj por la estiĝo de „Lexicon silvestre“. Interesita uzanto trovas en ĝi preskaŭ ĉiujn eseojn (germanajn kaj esperantlingvajn), traktantajn la metodikon kaj la terminologiajn procedojn dum la verkado de la vortaro. La akiritaj spertoj povas esti utilaj ankaŭ por la terminologia laboro en aliaj fakferoj.

183 p., kartonita, prezo: 10,00 Eŭroj

**ISBN 978-3-931262-68-6**



**STEFAN PANKA (2010, EDIT.):**  
**LEXICON SILVESTRE**  
**PRIMA PARS**  
**ESPERANTO-DEUTSCH-ESPERANTO**

En la dulingva volumo la uzanto trovos difinojn de ĉirkaŭ 1000 nocioj el la sfero de la forstmastumado, naturprotektado kaj ekologio. La libro, estiĝinta per instigo de multnombraj uzantoj, konsideras en la indekso-parto ankaŭ nociojn entenantajn en 8 pliaj volumoj kaj tial stimulas al konsulto kaj aĉeto.

300 p., kartonita, prezo: 26,00 Euro

**ISBN 978-3-931262-69-3**

## Helpu al Lexicon silvestre per viaj mondonacoj!

Lexicon silvestre estas kreata fare de la iniciativo de la publikutila Patrona Asocio "Lexicon silvestre" r.A. Ĝi estas financita ĉefe per mondonacoj..

**In Deutschland:**  
**Sparkasse Barnim in Eberswalde**  
**BLZ: 170 520 00**  
**Kto-Nr.: 390 108 81 04**

**International :**  
**IBAN: DE49 1705 2000 390 108 81 04**  
**BIC-/SWIFT-Code: WELA DE D1 GZE**

Multan dankon pro via subtenado!

## PRES-INDIKOJ

Kontaktadreso:	Eldonisto/Redaktoro:
Patrona Asocio „Lexicon silvestre“ e.V. Faka Alternejo Eberswalde D-ro Bernhard Götz Am Zainhammer 5 D-16225 Eberswalde Tel.: +49-3334-65 563 Fax: +49-3334-65 567 Email: <a href="mailto:kontakt@lexicon-silvestre.de">kontakt@lexicon-silvestre.de</a> Homepage: <a href="http://www.lexicon-silvestre.de">www.lexicon-silvestre.de</a>	Patrona Asocio „Lexicon silvestre“ e.V. Stefan Panka Joachimsthaler Str. 15a D-16230 Britz Tel: +49-3334-255 228 Email: <a href="mailto:s.panka@lexicon-silvestre.de">s.panka@lexicon-silvestre.de</a>